nia voĉo

madrida esperanto-liceo januaro 2022

## NI FESTIS LA ZAMENHOFAN TAGON SEKURE

Kiel anoncite en la decembra numero, madridanoj fine festis ĉeeste nian Tagon.

La 11an de decembro, kvar tagojn antaŭ la oficiala Zamenhofa Tago, ni celebris la naskiĝtagon de la iniciatinto. Dek ses homoj kunvenis ekde la 11a horo en la bela sidejo de la Fuenlabrada Esperanto-ligo, kie oni disponigis por nia evento grandegan salonon.

Bonvenigis nin la prezidanto de Madrida E-Liceo, Félix M. Jiménez Lobo. Poste la HEF-estrarano Ana Manero prezentis la du eldonaĵojn freŝe aperigitajn de HEF kadre de la projekto "Lorca". Sekve ni spektis interesan prelegon pri la tomboj en antikva Egiptio, kun lumbildoj kaj filmetoj, fare de Pedro Hernández. Post komuna manĝo en apuda restoracio kaj bela promeneto en la urbo, Juan del Castillo prezentis lumbildan ludon, en kiu ni devis solvi enigman murdon.

Jen kelkaj fotoj de la okazaĵo






## EN LA RADIO

La 15an de decembro mem, tuj post ĝia komenco, la Tago de Esperanto eĥis en radiostacio Radio Nacional de España. Konkrete, la programo "Gente Despierta" interparolis kun la direktoro de Fondumo Esperanto, José Antonio del Barrio.

Vi povas aŭskulti la programon en la adreso https://rtve.es/play/audios/gente-despierta/segunda-hora-15-12-2021/6247438/ (ekde min. 7)

## VIZITO DE LINGVA EMINENTULO



Dum la festoponto de decembro vizitis Madridon José Roberto Arze, direktoro de la Bolivia Akademio de la Hispana Lingvo, por partopreni en kunveno de la Asocio de Akademioj de la Hispana Lingvo, okaze de ĝia 70a datreveno. Sinjoro Arze bone parolas Esperanton kaj li estas la aŭtoro de la "Malgranda Bolivia Antologio". Li profitis la okazon por renkontiĝi dum iom da tempo kun lokaj esperantistoj (en la foto, kun Pedro Sanz), babili pri diversaj aferoj kaj akiri kelkajn librojn el la madridaj libroservoj.

Krome, vizitis la sidejon Vicente Costalago, madridano kiu nun loĝas en Svislando, alportante kelkajn librojn kiel donaco de la biblioteko de CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, en la urbo La Chaux-de-Fonds) por la biblioteko de HEF. Ni reciprokis per kelkaj produktaĵoj de HEF kaj de MEL.

## SCIENCA KALENDARO

Je la 1a de januaro komenciĝis la jaro 2022, kaj ankaŭ ekis la datrevenoj reliefigataj de la scienca lerneja kalendaro de la CSIC, kiu ĉijare havas version en Esperanto!

La kalendaron oni povos trovi en la adreso: https://digital.csic.es/handle/10261/256432 (kaj poste en la HEF-a Bitoteko). La oficialan prezentadon oni faros verŝajne la 11an de januaro, sed la materialo en Esperanto jam aperas de la komenco en la tŭitera konto de la iniciato: https://twitter.com/CalCientifico, kaj ankaŭ en https://twitter.com/SciKalendaro.

## POLPEJA RENDEVUO

Post la sukceso de la novembra unuasabata rendevuo, ni planis okazigi la januaran denove en la trinkejo de la strato Esperanto de Madrido. Temas pri la polpejo Pulpería O Miño, en la numero 2, je la suba ekstremo de la strato. Ĝi troviĝas proksime al metrostacio Alsacia, en lineo 2. La dato estos la sabato 8a de januaro, denove je la 18,30 horo.

Kelkaj intencas longigi la eventon kaj vespermanĝi en la polpejo.

Kompreneble, ĉio dependos de la prisanaj kondiĉoj, do tre atentu la lastminutajn novaĵojn.

## POR PLIAJ INFORMOJ

La sidejo plu malfermiĝos ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Tamen, ne estas antaŭvidataj nun pluaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL dum tiu ĉi monato.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

FELIĈAN NOVAN JARON 2022 AL ĈIUJ!

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

~~Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo~~

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com